

LA BIBLIO

La Biblio estas libro, kiu pretendas esti la Vorto de Dio. Aliaj 'sanktaj' libroj proklamas sin kiel la vortojn de iu profeto aŭ sanktulo, sed la homoj, kiuj skribis la Biblion ĉiam diris, ke Dio mem donis al ili la vortojn:-

"aperis al mi la vorto de la Eternulo, dirante...."

"Tiele diris la Eternulo...."

"Profeta vorto de la Eternulo al Izrael per...."

Jen mallonga resumo de kelkaj faktoj, kiuj subtenas tiun pretendon.

PLENUMITAJ PROFETAĴOJ

Babel -- Dio diris, ke tiu ĉi ĉefurbo de la antikva Babilona Imperio detruigĝos kaj neniam denove estos loĝata; nur sovaĝaj bestoj tie troviĝos. (*Jesaja 13:19-22, Jeremia 50:35-39, 51:26,37*) Tiuj vortoj jam precize plenumiĝis. Babelon oni neniam rekonstruis; la araboj eĉ ne starigas tie siajn tendojn, ĉar ili estas superstiĉaj pri la loko. Iu reĝo eĉ uzis la ruinojn kiel bestoĝardenon.

Tiro -- La Biblio profetis, ke tiu grava fenica haveno ne nur estos detruita, sed ankaŭ, ke ĝi estos ĵetita en la maron. (*Jeĥezkel 26:1-14*) Laŭ la historio, tio precize okazis. Nebukadnecar ruinigis ĝin, kaj en la jaro 332 a.k. Aleksandro la Eminentata uzis ĉiujn el la ŝtonoj kaj eĉ la polvon por konstrui digvojon al la apuda insulo por venki ĝin.

Izraelo -- Dio diris, ke la judoj estos disĵetitaj inter ĉiujn popolojn, sed ne ekstermiĝos; ankaŭ, ke ili revenos al sia lando. (*Readmono 28:1-14, Levidoj 26:33-34, Jeremia 30:7-11, Jeĥezkel 36:22-24*) Tio precize okazis; la judoj fine elpeliĝis el sia lando ĝis restis preskaŭ neniuj el ili. Dum jarcentoj ili suferis persekutadon en ĉiuj landoj, sed kontraŭ iu ordinara antaŭvido, ili ne malaperis. En la jaro 1948 p.k. stariĝis la Israela Ŝtato en tiu sama lando.

Jesuo -- En la Malnova Testamento troviĝas precizaj detaloj pri la naskiĝo, vivo kaj morto de Jesuo:-

1. Li naskiĝos de virgulino en Bet-Leĥem. (*Miĥa 5:2, Jesaja 7:14*)
2. Li resanigos malsanulojn kaj venigos esperon al mizeruloj. (*Jesaja 35:5-6, 29:18, 61:1-2*)
3. Li mortos per krucumo post terura sufero. (*Psalmo 22:14-16, Jesaja 53:5-7*)
4. Li soifos kaj ricevos vinagron. (*Psalmo 22:15, 69:21*)
5. Malamikoj ĉirkaŭos lin, mokante. (*Psalmo 22:7-8, 12-13, 17*)
6. Liajn vestojn oni dividos. (*Psalmo 22:18*)
7. Li ne sin defendos. (*Jesaja 53:7*)
8. Kvankam senkulpa, li mortos kaj entombiĝos inter krimuloj kaj riĉuloj. (*Jesaja 53:9*)
9. Dio revivigos kaj honoros lin. (*Jesaja 53:10,12, Psalmo 16:9-11*)
10. Li iros en la ĉielon. (*Psalmo 110:1*)
11. Li eniros en Jerusalemon sur azeno. (*Zeĥarja 9:9-10*)
12. Eĉ la tempo de lia alveno estis antaŭdirita. (*Daniel 9:24-26*)

Oni povas legi en Mateo, Marko, Luko kaj Johano pri la plenumo de tiuj profetaĵoj.

ARKEOLOGIAJ MALKOVRAĴOJ

Mortmaraj skribulaĵoj -- Tiujn oni trovis en 1947 p.k. Ili inkluzivas 38 el la 39 libroj de la Malnova Testamento, kaj estis skribitaj inter 100 kaj 200 a.k. Pro ili ni scias, ke nia Malnova Testamento estas fidinda. Ni povas legi la samajn vortojn, kiujn legis Jesuo.

Skribado -- Tiuj, kiuj kritikis la Biblion iam diradis, ke en la tempo de Moseo, ĉ. 1400 a.k., homoj ne sciis skribi.

Nun ni havas multajn argilajn tabulojn, datitajn pli frue ol 2000 a.k., trovitajn en Ebla, Ur, Kiŝ kaj aliaj lokoj.

Babel -- En la frua 19-a jarcento, kritikistoj ne kredis, ke iam ekzistis urbo Babel, sed dum la pli malfrua parto de tiu jarcento, arkeologistoj trovis ĝin.

La ŝtono de Moab -- Sur tio oni skribis pri Meŝa, reĝo de Moab. (2 Reĝoj 3:4)

La prismo de Sanĥerib -- Tio priskribas la sieĝon de Jerusalem. (2 Reĝoj 19)

La cilindro de Ciro -- Sur tio legeblas la ordonon liberigi la judojn el Persio. (Ezra 1)

La akvotunelo de Ĥizkija -- Tiun tunelon konstruis la reĝo Ĥizkija ĉ. 720 a.k., kaj oni trovis ĝin en 1880 p.k. (2 Kronikoj 32:2-4, 30, 2 Reĝoj 20:20, Jesaja 22:9-11)

SCIENCAJ ELTROVAĴOJ

Neniu scienca fakto kontraŭdiras la Bibliion. Gravus kompreni, ke ne eblas pruvi, ke mirakloj neniam okazis. Egale grava estas la fakto, ke 'scienco' ne povas klarigi la devenon de la universo. Estas fakto, ke nenio povas veni el nenio. La Biblio klarigas, ke Dio kreis ĉion, kaj ĝis nun neniu proponis pli kredeblan klarigon.

Darwin kaj aliaj homoj elpensis diversajn teoriojn de evoluo, sed tiuj ankoraŭ ne estas pruvitaj. Darwin sugestis, ke la vivo komenciĝis kiel 'simpla ĉelo', kiu fariĝis pli kaj pli komplika ĝis ĝi fariĝis homo. Ni scias nun, ke tiu 'simpla ĉelo' ja tute ne estas simpla. Ĝi estas tiel malsimpla, ke sciencistoj ankoraŭ ne scias ĉion pri ĝi. Malgraŭ la milionoj da fosilioj jam trovitaj, ne aperis iu ajn pruvo, ke iu specio iam ŝanĝiĝis al diversa specio.

LEĜOJ EN LA BIBLIO PRI LA SANO

Nur dum la pasintaj 150 jaroj homoj eltrovis, ke malsano povas deveni de infekto kaj malpuraĵo, sed la Bibliaj leĝoj donis instruon pri tio antaŭ 4000 jaroj:-

1. Enterigo de kloakaĵo. (Readmono 23:12-14)
2. Izoligo de infektitoj. (Levidoj 13, 14 kaj 15)
3. Purigo post iu kontakto kun infektito aŭ kadavro. (Nombroj 19)
4. Cirkumcido de knaboj en la aĝo de 8 tagoj. (Genezo 17:12) Nur antaŭ nelonge sciencistoj eltrovis, ke je precize tiu tago la sango plej rapide koaguliĝas.
5. Pura konduto pri edzeco; la Dia regulo estas: unu viro por unu virino sole. Tiamaniere la homoj evitas ĉian veneran malsanon. (Genezo 2:24, 1 Korintanoj 6:18)
6. Evito de porkaĵo kaj konkuloj. Sen ebleco frostigi porkaĵon, estas danĝere manĝi ĝin, kaj konkuloj el malpura akvo kaŭzas severan malsanon. (Levidoj 11)
7. Konservado de la tero. Pro neglekto de tiuj leĝoj homoj faris dezertojn, kaj specioj malaperis. (Readmono 20:19-20, 22:6-7, Levidoj 25:1-7)

Se la homoj eltrovis tiujn faktojn nur dum la lastatempaj jaroj, kiel Moseo povus scii skribi tiajn leĝojn?

Oni povus pritrakti multajn aliajn faktojn, kiuj subtenas la pretendon de la Biblio, sed la plej bona metodo estas legi ĝin por vi mem. Ĝi povas "fari vin saĝa por savo." (1 Timoteo 3:15-17)

J.Field